## Biletprezoj por veturado al Göteborg

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Helsinki—Göteborg | vaporŝipo Abo—Stockholm . . . . | 17.— | dol. | 36 | horoj |
| | sama per dua klaso . . . . . . . | 22.— | „ | | |
| Leningrad—Göteborg | vaporŝipo Abo—Stockholm . . . . | 20.— | „ | 52 | „ |
| | sama per dua klaso . . . . . . . | 25.50 | „ | | |
| Tallinn—Göteborg | vaporŝipo Tallinn—Stockholm . . . | 13.50 | „ | 36 | „ |
| | sama per dua klaso . . . . . . . | 19.— | „ | | |
| Warszawa—Göteborg | tra Berlin—Sassnitz . . . . . . . | 17.— | „ | 36 | „ |
| | sama per dua klaso . . . . . . . | 25.50 | „ | | |
| Berlin—Göteborg | tra Sassnitz . . . . . . . . . . | 46.— | mk. | 18 | „ |
| Wien—Göteborg | tra Praha—Sassnitz . . . . . . . | 19.— | dol. | 34 | „ |
| Praha—Göteborg | tra Berlin—Sassnitz . . . . . . . | 15.75 | „ | 30 | „ |
| Budapest—Göteborg | tra Praha—Sassnitz . . . . . . . | 21.75 | „ | 38 | „ |
| Bruxelles—Göteborg | via Köln—Hamburg . . . . . . . | 19.— | „ | 36 | „ |
| Paris—Göteborg | via Köln—Hamburg . . . . . . . | 21.75 | „ | 38 | „ |
| London—Göteborg | rekte per vaporŝipo . . . . . . . | 4.6.9 | pund. | 40 | „ |
| | sama per dua klaso . . . . . . . | 6.5.6 | „ | | |
| New York—Göteborg | per vaporŝipo Gripsholm . . . . | 108.— | dol. | 10 | tagoj |
| Buenos-Aires—Göteborg | via Hamburg . . . . . . . . . . | 25.— | pund. | 3 | semajnoj |
| Tokio—Göteborg | via Londono (nur dua klaso) . . . | 75.— | „ | 7 | „ |
| Alger—Göteborg | via Marseille—Paris—Köln . . . . | 48.— | dol. | 4 | tagoj |

*Se vi venos pli frue ol komencos la Kongreso* komuniku al ni tion, por ke ni povu atendi vin!

Por la Organiza Komitato:
*Einar Adamson* (prezidanto).

### PRI SAT-KONFERENCO

**K-do Adamson proponis, ke ĝi okazu ĉe Göteborg samtempe aŭ antaŭ la VIII-a SAT-Kongreso. Ĉar diversaj sindikatoj sendos reprezentantojn al tiu ĉi lasta, ili certe konsentus mortigi du birdojn per unu ŝtonjeto. La nura malhelpo estas la granda veturkosto kompare je Hamburgo aŭ Amsterdamo aŭ Antverpeno. Eble multaj kongresantoj povus ricevi rajton paroli en la nomo de diversaj kultur-, sport-, junul-, partia-, sindikat-asocioj. Almenaŭ per klarigo de la diskutota tagordo ili penu havi tion. Certe se ni povos unuigi parte la du aferojn ne mankos interpretantoj, sed nur en la Konferenco la diversaj naciaj lingvoj aŭdiĝos kompreneble. Por finfine aranĝi la programon, urĝas, ke SAT-anoj legu la detalojn en n-roj 157 kaj 168 kaj sendu proponojn, konsilojn, ktp.** *488.* (London).

### POST LA VII-a KONGRESO DE SAT

Kiam la Lyonaj SAT-anoj prenis sur sin la altan taskon, timo terurigis ilin. Ĉu ili sukcesos laŭ ĉies postulo? Ĉu ili pravigos la fidon de EK.?

Honteme ili konfesas sian nepravigitan timon... SAT ricevis oficialan apogon de Lyona popolo. Firma kaj memstara estas hodiaŭ la pozicio de nia movado en Lyon kaj en Francio.

Ĉie marŝas la laboro. Aliĝoj alfluas, grupoj estas fondataj. Jen rezulto praktika de la VII-a! Tio ĝojigas la aranĝintojn, kiuj per laboro festis la 40-jaran jubileon de Zamenhofa lingvo.

Finance ni ankaŭ ne malsukcesis, kiel montras la suba raporto; eĉ SAT-kaso iomete profitas.

Kiel la VII-a helpis al ni en nia propagando por varbi novajn adeptojn, tiel ankaŭ la VIII-a en Göteborg plikreskigu nian movadon...

Tio estas nia sincera deziro...

*Marcel Roux.*

**N. LENIN:**
**Ŝtato kaj Revolucio**
150 paĝoj, formato 12×18 cm. Prezo 1 mk. g.
Mendu tuj ĉe la Administracio de SAT
**R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27**

### KONTRAŬ LA MALSERIOZULOJ

**Multaj membroj plendas kontraŭ aliaj, kiuj ne respondas al leteroj (eĉ rekomenditaj, do certe ricevitaj) konformaj al la artikolo 34 de nia statuto. Tio misfamigas nian aferon kaj ankaŭ senkuraĝigas, forpuŝas novajn adeptojn. Necesas fingre montri la kulpulojn, kiuj tiel facilanime fuŝas nian serv-aparaton. Tial de nun ni publikigos iliajn nomojn en SENNACIULO. Sed la pordo de tiu rubriko ne estos malfermata al ĉiuj, ĉar ne ĉiam kulpa estas la ricevanto, sed ofte la sendinto, kies informpeto ne konformiĝis al la artikolo 34, precipe al la punkto ĉ de tiu artikolo. Do por kvazaŭ kribri la plendojn, ni publikigos nur: 1. la plendojn pri nerespondo al letero (rekom. aŭ ne) de grupo aŭ de ia kolektivo.** *Direkcio de SAT.*

**La "Fundamento de Esperanto"[1]) devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta k o n t r o l i l o, kiu gardos lin de deflankiĝo de la vojo de unueco.**

**L. L. Zamenhof.**

[1]) Mendebla ĉe nia Administrejo.

### Kiu estas kulpa?

Jam depost 3 jaroj mi spertas jenon: Preskaŭ ĉiu letero, enhavanta PM por kolektantoj kaj adresita al Sovetio, ne alvenis, se ĝi ne estis enregistrita. PK, L, jurnaloj ktp. ĉiam alvenis. Sed leteroj kun PM "perdiĝis survoje!" Ĉu ekzistas leĝo en Sovetio malpermesanta interŝanĝon de PM stampitaj? Mi petas informojn de Gek-doj, kiuj havas intereson je tiu temo.

*Esperanto-Informejo, Schweidnitz* (Germ.).

### Ĉe liberpensuloj

Komence de 1927 mi faris proponojn al diversaj redakcioj de ateistaj gazetoj, kiuj jam uzas aŭ simpatias esperanton, ke ili presigu sur la unua paĝo de siaj gazetoj la frazon: "Oni korespondas esperante." Ĝis nun mi sukcesis ĉe jenaj gazetoj: "Le Matérialiste", adreso: Emile Chapelier, 138a rue Hotel des Monnaies, Bruxelles (Belgio), "De Tribun", adreso: Wilgenstraat 8b, Antwerpen (Belgio), "De Vrijdenker", adreso: C. F. Everts, Vespuccistraat 91, Amsterdam (Nederlando), "Der Freidenker" und "Neues Leben", adreso: Paul Fischer, Kettwiger Str. 15, I, Essen a.R. (Germanio), "Freie Weltanschauung", adreso: Max Tonner, Kreuzstr. 13a, Itzling ĉe Salzburg (Aŭstrio), "Bezvirnik", adreso: Dm. Ignatjuk, ul. Libknechta 64, Ĥarkov (Ukrainio). La liston de la enhavo publikigas ankaŭ esperante la pola gazeto "Zycie Wolne", adreso: Piekna n-o 44 m. 21, Warszawa (Polio). *La redakcioj de la nomitaj gazetoj deziras ricevi artikolojn kaj gravajn sciigojn el la liberpensa mondo per esperanto.* Skribu kaj gratulu ilin pro ilia ago. Progresemaj esperanto-gazetoj estas petataj publikigi ĉi supran noton.

*K. Hubricht, Leipzig O 30.*

## Kaso-spezoj de la 7-a Kongreso

| *Enspezoj:* | fr. fr. |
|---|---|
| Donaco de: kolekto en Haarlem . . | 30.— |
| Amsterdama Grupo . . | 37.50 |
| Irkutsk-SAT-filio . . . | 36.— |
| Dresden-SAT-anaro . . | 153.— |
| Esp. Lab. Gr. en Solenau | 8.50 |
| Prolet.-Esper. Alger . . | 8.— |
| Brusela Grupo . . . . | 31.95 |
| Esp. Lab. Gr. en Béziers | 8.— |
| Norvega Esp. Lab. Fed. | 93.70 |
| SAT-rondo de Baracaldo | 34.85 |
| Kotizoj (354) . . . . . . . . . | 3 492.80 |
| Subvencio de la Lyon'a urbestraro . | 1 000.— |
| Vendo de poŝtkartoj kaj gvidlibroj | 692.45 |
| Vendo de fotografaĵoj . . . . . . | 871.70 |
| Donacoj de diversaj K-doj . . . . | 223.35 |
| | 6.721.80 |

| *Elspezoj:* | | fr. fr. |
|---|---|---|
| Aliĝiloj . . . . . . . . . . . . | | 300.— |
| Banderoloj . . . . . . . . . . | | 368.50 |
| Koncerto de l' salutvespero . . . | | 250.— |
| Luo de l' Kongresejo . . . . . . | | 700.— |
| Luo de tabloj, seĝoj ktp. . . . | | 750.60 |
| Kongreskartoj kaj afiŝoj . . . . | | 285.— |
| 10 000 ilustritaj poŝtkartoj . . . . | | 1080.— |
| 150 fotografaĵoj . . . . . . . | | 1260.— |
| Luo de ĉambroj por fakaj kunvenoj | | 82.50 |
| Stampiloj, brakrubandoj de komisaroj, cirkuleroj, programoj, afrankelspezoj, telegramoj, afiŝmarkoj, ktp. | | 907.80 |
| Gvidlibroj . . . . . . . . . . | | 75.— |
| Saldo dispartigita | | |
| al Lyona Fed. de Int. Ruĝa Helpo | 100.— | |
| al Lyona Esp. Lab. Grupo . . . | 400.— | |
| al SAT . . . . . . . . . . . | 162.40 | 662.40 |
| | | 6.721.80 |

Kontoj unuanime aprobitaj de la Lyona SAT-anaro la 5-an de decembro 1927.

La ĝen. kasisto: *L. Chaussade.*

La Prezidanto de l' Komitato: *M. Roux.*

**La fervoro kaj diligenteco de niaj Lyonaj K-doj meritas ĉies laŭdon. Ĉi-okaze ni bedaŭru, ke en Leningrad la afero ne iras tiom glate kaj rapide, ĉar ĝis nun ni ne povis publikigi la bilancon de nia VI-a.** E. K.